7.7 La Senato unuanime alelektis por la resto de sia deĵortempo la direktorinon de la prezidanta sekretariejo, ASci.Mag. Joanna Lewoc, kiel novan senatan sekretarion. Ekde septembro AIS enbuĝetigu monatajn elspezojn por ŝi, kiuj estu sume (t.e. inkluzive eblajn laŭleĝajn kontribuojn de AIS por asekuro, feriumado ktp.) limigitaj al 2.000,- DM. Tiu sumo ne reduktiĝos pro ŝiaj eblaj enspezoj el aliaj fontoj, ekz. pro honorarioj ricevotaj de la AIS-Instituto pri Kibernetiko aŭ profitoj el laboroj por IfK-Verlag.

8. *(Akademiaj rekomendoj)*
Kiel temon de la Akademia Forumo dum SUS 13 la senato elektis „Kion eblas kaj kion decas fari por plurlingveco en la mondo?“ Gvidu denove kolego Fößmeier la forumon, kiun iniciatu per reliefigo de siaj kontraŭaj pozicioj la aŭtoroj de „Por plurlingveco de Eŭropo“.

9. *(Diversaĵoj)*
9.1 Ne restis tempo por plukontroli la plenumitecon de la pli fruaj senatdecidoj laŭ la listo preparita de la antaŭa senata sekretario ADoc.Dr. Chrdle. La nova senata sekretariino prezentu la liston al la Senato en Sibiu.

9.2 La senato kunvenu al sia 25a kunsido dum SUS 14 en Sibiu sabaton, je 1994-09-24, je la 18a horo je loko pri kiu la senatanoj surloke informiĝu ĉe la gvidantkomitato de AIS Rumanio (prezidantino: ASci.Mag. Sara Reisenauer). Oni precipe pritraktos la aperigadproceduron de Acta Sanmarinensia, la kunlaboron kun Akademia Libroservo, la situacion en Pollando, en Rumanio kaj en Bulgario, la proceduron de enregistrigado de sciencistaj gradoj kaj titoloj, la studadplanojn de la sekcioj 3 kaj 6 kaj eventualajn aŭspiciojn de konferencoj.

1994-09-10/1694pfR

Protokolis: OProf.Dr.habil.H.Frank, prezidanto

Protokolo de la Asembleo de la Subtena Sektoro de AIS, okazinta kadre de SUS 13, dimanĉon, la 28an de aŭgusto 1994 en San Marino.

1. *(Formalaĵoj)*
La kunvoko okazis konforme al art. 9.3 de la regularo pri instruado kaj studado. Vicdirektoro OProf. Grego malfermis kaj gvidis la kunsidon. Ne estis dubo pri la kvorumeco nek protestoj kontraŭ la protokolo.

2. *(Ĝenerala raporto)*
SMdAIS Umeda, kies elekto kiel nova direktoro estis konsiderita, ne povis partopreni kaj ne jam estis formale elektita kiel direktoro. Vicdirektoro Grego ne vidis siaflanke ion raportendan.

3. *(Financa raporto)*
La prezidanto dankis al la „Asocio subtenanta en San Marino la Akademion Internacian de la Sciencoj" (uzota mallongigo en ĉi tiu protokolo: AsS AIS) per ties reprezentantino en la Asembleo, Honora Direktorino ASci.Mag.h.c. Marina Michelotti, por la kontribuo al la laboro de la Scienca Sektoro. Konforme al la speciala interkonsento de 1995-09-05/1693pfR inter la prezidanto kiel reprezentanto de la Senato kaj la Honora Direktorino kiel reprezentantino de la AsSAIS por 31 sanmarinaj kaj 18 italaj anoj de AsSAIS, kiuj pagis 1994 po 75.000 LIT, estis pagitaj 30%, sume 1.102.500 LIT.
La prezidanto klarigis ĉi-konekse, ke la konto-numero de AsSAIS ĉe Banca Agricola Commerciale della Repubblica di San Marino estas 644, kaj ke AsSAIS kiel ununura kolektiva membro de la SubS (t.e. kiel ununura organizaĵo apartenanta al la SubS-sekcio de la kolektivaj membroj) ne havas juran memstarecon (kontraste al la ruslingva AsAIS, al ĈAIS en Ĉeĥio, RAIS en Rumanio, SAIS en Slovakio kaj la starigata asocio subtenanta AIS en Pollando). Pro tio, ke do AsSAIS jure nur ekzistas kadre de AIS, ĝia konto, kontrolata de Honora Direktorino Mag.h.c. Marina Michelotti, devas aperi en la spezokalkulo kaj la bilanco de AIS (kontraste al la kontoj de la aliaj kolektivaj membroj). Tamen, same kiel ĉiu alia kolektiva membro, ankaŭ AsSAIS pagas 0,7 AKU al la SubS (krom la 30% de siaj kotizoj interkonsentokonforme pagendaj al la SciS). En tiu punkto estas diferenco al AIS Deutschland kaj eblaj aliaj landaj aŭ regionaj sekcioj de la SubS. Ili estas peranto-asocioj, kiuj ne estas kolektivaj membroj sed perantoj de la enlandaj aŭ tiuregionaj individuaj membroj, por kiuj ili havigas po 0,7 AKU al la SubS kaj po 0,3 AKU al la SciS, do pli ol AsSAIS el siaj enspezoj. Kompence la individuaj subtenaj membroj ricevas aŭtomate la revuon „GrKG/H" kun la oficialaj sciigoj de AIS senpage, la membroj de AsSAIS nur laŭpete; krome al ĉiu kolektiva membro estas sendata po unu ekzemplero cele pluan diskonigon. La membrokotizo de individuaj kaj de kolektivaj membroj estas jare 1 AKU. La kolektivaj membroj, estante jure sendependaj, libere decidas pri la kotizo pagenda de siaj membroj; la kotizo pagenda al AsSAIS estas fiksenda inter 0,5 AKU kaj 1 AKU – momente 75.000 LIT. Laŭ sciigo de Mag.h.c. Marina Michelotti plej probable ne estos ŝanĝdecido fare de la membrokunveno de AsSAIS okazonta pro ŝia kunvoko en la oktobro 1994.
Sen kromaj rimarkigoj la Asembelo aŭdis pli detalajn klarigojn de la reprezentantino de AsSAIS kaj de trezoristo ADoc. Maertens.

4. *(Decidoj pri proponoj)*
Trezoristo ADoc. Maertens proponis (pro la kialoj jam diskutitaj 1993 en la Senato kaj la Asembleo de la Subtena Sektoro) kiel valoron de la AKU ekde la unua de januaro 1995 125,- DM = 125.000 LIT. La propono estas unuanime akceptita. Oni akceptos ne celligitajn enpagojn por la servobonhavo ekde tuj nur laŭ tiu estonta kurzo. Eblas antaŭpagi kotizojn por ajna nombro da postaj jaroj laŭ la aktuala kurzo 1 AKU = 100,- DM = 100.000 LIT. La trezoristo kaj la prezidanto rekomendas al ĉiuj individuaj membroj akiri per unufoja pago de 25 AKU la dumvivan membrecon; ĝis la 31a de decembro 1994 sufiĉas 2.500,- DM aŭ 2.500.000 LIT; ekde la januaro 1995 la dumviva membreco kostos 3.125,- DM = 3.125.000 LIT.
La prezidanto substrekis, ke por la membroj de AsSAIS tio ne necese signifas plialtigon de la kotizo, ĉar la ĝisnuna kotizo - 75.000 LIT - ankaŭ en 1995 ankoraŭ superos 0,5 AKU, t.e. tiam 62.500 LIT. Nur la kotizo pagenda de AsSAIS al la SubS kiel kolektiva membro, t.e. unufoje 0,7 AKU, plialtiĝos 1995 al 87.500 LIT.

5. *(Elektoj)*
Oni konstatas, ke D.Besseghini ne ĉeestas kaj ne deklaris pretecon resti sekretario. PDoc.Dr. Bormann deklaras eksiĝon el la estraro por kandidatiĝi kiel revizoro. Restas estraranoj ĝis la fino de 1995 OProf. Grego, ADoc.Dr. Chrdle, ASci.Mag. Marina Michelotti, d-ro Piotrowski kaj S-ro Umeda. Unuanime oni elektis kiel trezoriston ankaŭ de la SubS ADoc. Maertens (konstatante, ke ASci.Mag. Michelotti daŭre respondecas pri la konto 644 de la

AsSAIS) kaj kiel sekretarion OProf.Dr.habil. Frank. La asembleo rekomendis kaj la estraranoj tuj elektis la estraranon OProf. Grego kiel novan direktoron, la estraranon Piotrowski kiel novan vicdirektoron de la SubS.
La estraro por la jaroj 1996-1999 estas elektenda dum SUS 15 la dimanĉon, je 1995-08-27.

6. *(Diversaĵoj)*
ADoc. Maertens intertempe ricevis la pasintjare promesitan kompletan liston de la AsSAISanoj.
Laŭ la regularo okazos la sekvanta asembleo jam dum SUS 14 en Sibiu-Hermannstadt, la dimanĉon, 25an de septembro 1994.

1994-09-09/1694 pfR
Protokolis: OProf.Dr.habil. H.Frank

Protokolo de la 17-a Ĝenerala Asembleo (la 14a post la oficialigo) de AIS San Marino, je 1994-09-02/1693pfR, 15:15-17:30 h en la Liceo, salono Boulanger.

1. *(Formalaĵoj)*
La kunvoko okazis konforme al la regularo (art. 8 de la statuto kune kun art. 9.4 de la regularo pri instruado kaj studado). Neĉeestintaj efektivaj membroj estis delegintaj sian voĉdonrajton; pri la kvorumeco ne ekestis duboj. Oni aprobis la ĉeeston de gastoj, elektis la prezidanton protokolisto kaj aprobis la protokolon de la 16-a ĜA kiel ĝi estas publikigita en GrKG/H. 34(4), 1993, p. 190-191. Oni akceptis la tagordon antaŭviditan de la regularo.

2. *(Ĝenerala Raporto de la Senato)*
La prezidanto raportis pri la 24a senatkunsido, precipe
– pri la neceso akiri pli da partoprenantoj en kursoj kaj ekzamenoj, pli da dumvivaj apartenantoj, kaj pli da enspezoj el internaciaj projektoj kaj el investoj, krome
– pri la kreskanta intereso pri AIS-aktivecoj precipe en reformeŭropaj landoj,
– pri la decido konservi almenaŭ ĝis la fino de 1995 la Senatan Sidejon en San Marino,
– pri klopodoj rekomenci la regulan interkonsiliĝon kun la sanmarina registaro,
– pri nova klopodo de kunlaborado kun UEA,
– pri la eldona aktiveco de la internacia eldongrupo scienca „Akademia Libroservo" kaj
– pri la preteco de la iama gvidantino de la sanmarina senata buroo, Gisela Sammaritani SMdAIS (telefakso kaj telefono: 00378-901009) kaj de la Honora Senatanino dott.ssa Fausta Morganti, transpreni la rolon de perantoj al la sanmarina subtena AIS-grupo kaj de sanmarina kontaktpunkto dum kiam ne funkcias la faksilo en la Senata Sidejo.
(Detalojn vd. la senatprotokolon.)
Dum la diskuto oni rekomendis strebi al pli aktiva kunlaborado kun UEA dum la Universala Kongreso en Tampere (SF) venantjare kaj oferti kunlaboron kun ILEI en San Marino, kie ankaŭ ILEI havas sian juran sidejon.

3. *(Financa raporto)*
La trezoristo ADoc. Maertens, kiu ne povis resti en RSM ĝis la ĜA, estis petinta senatanon OProf. Minnaja prezenti la bilancon por 1993 kaj buĝeton. Pro tio, ke neniu de tiuj, al kiuj la ĜA deziris konfidi la oficon de revizoroj, tion ĝis nun akceptis, la prezidanto kaj la trezoristo estis komisiintaj al PDoc.Dr. Bormann la kontroladon de la financado de la Akademio konforme al art. 19 de la statuto. Ankaŭ ASci.Mag. Kobiela estis invitita kaj montrinta principan pretecon helpi, sed momente estas tro ŝarĝita je aliaj taskoj. PDoc.Dr. Bormann raportis pri sia dutaga kontrollaboro en la prezidanta sekretariejo en Paderborn en la ĉeesto ankaŭ de la trezoristo. Li reliefigis konforme al la statuto la plej signifoplenajn aspektojn de la finkalkulo, bilanco kaj buĝeto kaj anoncis, ke li interkonsentis - kaze ke oni elektos lin revizoro - finpritrakti ĉion kune kun la trezoristo kaj la elektenda dua revizoro en Paderborn ankoraŭ dum la monato oktobro. La ĜA diskutis la situacion kaj aprobis sen kontraŭvoĉo la proponitan solvon.

4. *(Decidoj)*
Unuanime oni decidis okazigi SUS 15 je 1995-08-27/09-04. Se ne montriĝos obstakloj, kiujn la senato, dum sia kunsido fine de marto 1995, taksos esti gravaj kaj nevenkeblaj, SUS 15 okazos kiel kutime en San Marino. Laŭstatute dum SUS 15 okazos por 1996-1999 la elektoj de la nova Senato kaj de la nova estraro de la subtena sektoro; krome estos elektataj la (vic)dekanoj kaj (vic)fakarestroj por la sama periodo.
La prezidanto (zorgu sen plua atendo al eblo prie interkonsiliĝi kun la ministro pri publika instruado, kulturo kaj juro), en kontakto kun la komitato por regular-reformo kaj en interkonsento kun la senato, pri la bontempa apero de la plibonigita regularo, respektante la ĝeneralajn indikojn de la pasintjara ĜA. En raraj kazoj de oportuno por la progreso de AIS estu ebla jam antaŭ la kompleta plenumo de

ĉiuj aliaj kondiĉoj la alvoko de kompetentaj sciencistoj, kiuj nacinivela jam estas ordaj profesoroj, kiel profesoroj ankaŭ de AIS. Enestu en la regularo la dumviva membreco je 25 AKU por subtenaj membroj, 2,5 AKU por ISKanoj, kaj unuecigo de la simbola kotizo al 0,1 AKU por ĉiuj ISKanoj. La regularo evitu laŭeble malgravajn detalojn kaj ripetojn kaj montru la maturiĝon de AIS kiel sendependa, internacia universitatnivela esplor- kaj kleriginstitucio.

Por ebligi pli efikan administradon la ĜA alvokas ĉiujn ISKanojn akiri antaŭ la jarfino (profitante de la nuna AKU-kurzo) almenaŭ la dumvivan ISKanecon, se finance ne eblas anstataŭe akiri la dumvivan subtenan membrecon. Ĉi tiu ne nur inkluzivu la simbolan kotizon kiel ISKano sed ankaŭ la aliĝkotizon al ĉiuj estontaj SUSoj.

5. *(Kromaj tagordaj punktoj)*

Oni ne estis decidinta dum la tagorda punkto 1 aldoni kromajn tagordajn punktojn.

6. *(Elektoj)*

La prezidanto informis, ke vicrevizorino Sachs demisiis.

Oni elektis unuanime PDoc.Dr. Werner Bormann kaj (en foresto) PDoc. Rudolf Fischer, ambaŭ el Germanio, revizoroj por la deĵorjaroj de la nuna senato. Ambaŭ akceptis. Kiel nova vicrevizoro same unuanime estis elektata la ĉeestinta dott. Gianfranco Polerani el Milano; ankaŭ li akceptis kaj speciale okupiĝos pri la kontoj en San Marino.

7. *(Diversaĵoj)*

La prezidanto memorigis, ke la 18-a ĜA okazos la tagon de la ferma solenaĵo de SUS 14 en Sibiu-Hermannstadt, la 1-an de oktobro 1994, 18 h.

Laŭ propono de partoprenintoj la protokolo ne nur estos publikigata en GrKG/H., sed ankaŭ distribuata per la elektronika reto.

1994-09-09/1694 pfR
Protokolis: OProf.Dr.habil.H.Frank

Protokolo de la 25-a kunsido de la Senato (la 19-a post la oficialigo) de AIS okazinta dum SUS 14 en la Universitato de Sibiu (Rumanio), de la dimanĉo, 25a, 11:15 h, ĝis la vendredo, 30a de septembro, 1994/1694pfR, 23:30 h.

1. *(Formalaĵoj, superrigarda raporto)*

1.1 La senatkunsidon persone ĉeestis 5 de la 9 senatanoj ankoraŭ deĵorantaj ĝis la fino de la periodo 1992-1995 (elektitaj: Frank, Quednau, Tyblewski, Wickström; alelektita: senata sekretariino J.Lewoc). La senato do estis kvoruma. La senatanoj Maertens, Minnaja, Pennacchietti kaj Sachs estis anoncintaj sian foreston, sed senatano Minnaja delegis sian voĉon al vicsenatano Holdgrün, kiu partoprenis. Anstataŭante la direktoron de la Subtena Sektoro parttempe ĉeestis ankaŭ vicdirektoro Piotrowski.

1.2 Oni aprobis la protokolon de la 24a kunsido kiel publikigota en grkg/H. 35/4, 1994.

1.3 La prezidanto donis superrigardon super la decidendaj problemoj kaj krome sciigis:

– La registro-folio pri la du finekzamenoj okazintaj dum SUS 13 estas kun subskribo AIS-flanka transdonita subskribcele al la Dikastero. De la disertacio de Dr.habil.V.Barandovská estas jam ricevitaj 6 ekzempleroj en la akceptita formo. Po unu estos senpere post SUS 14 transdonata kun la peto registri la akiritan gradon ankaŭ en la Rumanan, Slovakan kaj Ĉeĥan registrojn al la por tio kompetentaj reprezentantoj de la universitatoj en Sibiu, Nitra kaj Praha. En la slovakan kaj ĉeĥan registrojn la prezidanto samtempe petos enigi la pozitivajn ekzamenrezultojn de SUS 14.

– Bedaŭrinde ASci. Jarmark ne povis veni por persone pritrakti kun la senato la kunlaboron inter la de li fondita Eŭropa Universitato Poznan kaj AIS.

– La anoncitaj studadplanoj por originala bakalaŭriĝo en la sekcioj 3 kaj 6 ankoraŭ ne estas pretaj por aprobo.

2. *(Honorigoj)*

2.1 La senato petas la prezidanton alvoki al la akademio kiel efektivan membron kun aparteneckategorio „asociita membro de AIS (AMdAIS)“ kaj rangotitolo „Plenrajta Docento (PDoc)“ Dr.sc.hum. habil.Vera Barandovská-Frank por la fako „interlingvistiko“ de sekcio 2.

2.2 La senato aprobas, ke la alvoko de kolego Sellin kiel AProf. por la fako logiko okazu al sekcio 4 anstataŭ 3.

2.3 La senato petas la prezidanton prepari la alvokon de la plenrajtaj docentoj Dr.Angstl kaj Dr.Bormann kiel asociitaj profesoroj al la sekcioj 2 resp. 4 ekde SUS 15, kondiĉe ke li estos antaŭe ricevinta de plenrajta membro la ankoraŭ necesan skriban rekomendon kun reliefigo de la alvokindeco.

3. *(Instruado kaj ekzamenado)*

3.1 La Senato elektis por SUS 14 el la partoprenantaro de la ses sekcioj la jenajn membrojn en la ekzamenoficon (aldone al la membroj jam elektitaj por la tuta deĵortempo de la senato):

Sekcio 1: OProf.Wickström (OProf. Fößmeier)
Sekcio 2: neniun (OProf.Kuznecov)
Sekcio 3: OProf.Holdgrün (OProf. Minnaja)
Sekcio 4: AProf.Sellin (OProf.Bociort)
Sekcio 5: OProf.Quednau (OProf. Maitzen)
Sekcio 6: neniun (OProf.Tyblewski).

3.2 La Senato rekomendas al la ekzamenofico, gvidota dum SUS 15 de OProf.Wickström (sekretario: ASci.Mag.J.Lewoc), aldone al la po 6 komitatanoj por la bakalaŭriĝo de la Rumanaj kandidatinoj aligi al ĝi kiel observantinon ADoc.Mag.Reisenauer aŭ ADoc.Moga, i.a. cele akiron de konstato pri la rumanlingva kolumno de la verkaĵo.

3.3 La studenta legitimilo, kiu - en provizora formo - la unuan fojon dum SUS 14 estas akirebla (kontraŭ 0,5 AKU), bezonas kelkajn senerarigojn realigendajn por 1995. Ĝi validas ĝis la atingo de la indikenda studadcelo, sed maksimume dum 3 plenaj kalendaraj jaroj; krome ĝi liberigas de la pago de enskribiĝkotizo al SUS, se aliĝo kun indiko de la studenta numero okazas 1 monaton antaŭ la komenco de SUS; kiu aliĝas malpli frue aŭ nur surloke pagas 0,2 AKU anstataŭ 0,5 AKU.

3.4 Pro manko de ajna efektiva membro el la sekcio 2 dum SUS 14 la partoprenantaj efektivaj membroj el la kvin aliaj sekcioj, t.e. la kolegoj Frank, Wickström, Holdgrün, Sellin, Quednau kaj Tyblewski, aŭskultu la projektakceptigan prelegon cele doktoriĝon de ASci.Preotu kaj skribu ilian koncernan opinion al la ankaŭ fake kompetenta dekano de la dua sekcio, OProf.Pennacchietti.

4. *(Sciencaj konferencoj)*
La Senato aprobas, ke ADoc.Dr.Medvedev okazigos per sia Moskva Centro „Lingvo-Kulturo-Ekologio" 1995-06-26/07-01 en Poprad (SK) la Forumon pri „Etnoj kaj Naturo" en la lingvoj slovaka, ILo, angla kaj rusa ne nur sub kunaŭspicio de AIS pere de ties morfoscienca sekcio, sed ke la sekcio 6 klopodu okazigi en ĉi tiu kadro studadsesion de AIS, kondiĉe ke eblas realigi almenaŭ tri kursojn per docentoj de AIS. Ne necesas ke ili ĉiuj apartenas al la sesa sekcio. Per publikigo de ĉi tiu protokolo ĉiuj sekcioj estos informitaj kaj invititaj al apogo. - Oni ne kontraŭas, ke Dr.Medvedev mencias sur sia leterpapero uzata konekse al la menciita forumo ĉi tiun kunlaboron kun AIS.

5. *(Publikigado)*
5.1 La senato ricevis la informon, ke dum SUS 14 estis kunsido de reprezentantoj de la Internacia Eldongrupo Scienca „Akademia Libroservo", kaj kontente eksciis, (1) ke intencas esti resp. resti aktivaj membroj la eldonejoj IfK/Verlagsabteilung (en Germanio; reprezentata de ASci.Mag.J.Lewoc), Kava-Pech (en Ĉeĥio; reprezentata de ADoc.Dr. Chrdle), Libro (en Pollando; reprezentata de OProf. Dr.habil. Tyblewski) kaj Promedia (en Rumanio; reprezentota de A.Trif) kaj (2) ke ĝis alia elekto ASci.Mag.J.Lewoc reprezentos la grupon vid-al-vide la senaton. La prezidanto akiru interkonsenton kun la grupo konforme al ties interna interkonsento kaj la senatdecidoj. Krome OProf. Sachs restu la kontaktpersono de la senato al la grupo.

5.2 La kompetentaj sciencistoj de AIS estas petataj laŭ peto de Akademia Libroservo esti je dispono por redakciaj konsiloj rilate la eldonon de ajna nova libro, kiu eventuale aperos ĉe Akademia Libroservo. Al la redakcio regule apartenu la senata delegito, t.e. momente OProf.Sachs, kaj respondeculo de la eldonejo, pere de kiu la volumon eldonas AL. Por la kajeroj de Acta Sanmarinensia validu la jena regulo: pri la enhavo de kajero kun SUS-kurso de efektiva membro (serio L) respondecu ĉi tiu, kaj li apartenu al la redakcio; kajero kun diversaj SUS-prelegoj el sekcio (serio P) estu kompilita de la koncerna dekano aŭ de la daŭra taskplenumanto de la sekcio - la kompilanto apartenu al la redakcio; decidojn pri kajeroj de la serio D (diversaĵoj) faru la senato. La aŭtoroj de kursoj interkonsentu kun la senata delegito (OProf.Sachs) pri aperigo de la teksto. Se la delegito sentas sin ne sufiĉe kompetenta, tiam li kontaktu la dekanon aŭ daŭran taskoplenumanton de la koncerna sekcio. Ricevinte la aprobon de la delegito, la aŭtoro de kurso interkonsentu pri aperigkondiĉoj kun unu el la kunlaborantaj eldonejoj. La senato konstatas, ke momente ne jam ekzistas interkonsentoj pri nova volumo, tiel ke nenio plu aperu ekster la nun fiksitaj kondiĉoj.

5.3 La senato aprobas la proponon de la prezidanto kaj de la vicdirektoro de la Subtena Sektoro, ke la prizorgado de la regularo de AIS same kiel de la Internacia Scienca Dokumentaro transiru de la Subtena Sektoro al la Scienca Sektoro. Pri la disvendado estu trovata interkonsento kun Akademia Libroservo.

6. *(Kunlaborprojektoj)*
6.1 ADoc.Lewanderska kunlaboras jam ekde 1965 kun „Internacia Etnografia Asocio - Laborgrupo Karpatoj"; OProf.Quednau planas partopreni en projektoj, kiuj rilatas al statistiko kaj/aŭ informadiko. Tiu komuna agado okazu enkadre de la kunlaboro de AIS kaj la universitato en Sibiu. Estu ellaborata studadprogramo pri etnografio en tiu kadro.

6.2 La senato ne kontraŭas la eventualan realigon de la decido de sekcio 1, kunkrei kun GPI kaj eventuale kun Institut für Kybernetik Berlin e.V. premion Wiener/Schmidt, se pri la detaloj akceptebla interkonsento estos trovita.

7. *(Organiza stabiligo)*
7.1 La senato dankas al la Asembleo de la Subtena Sektoro rezigni estonte pri la enskribiĝkotizoj al SUS kaj aprobas, ke kompense la preskostojn de la programo kaj la kostojn de la ŝildoj por la partoprenantoj kovras la scienca sektoro. Krome la senato respektos la pli fruan decidon de la Subtena Sektoro liberigi dumvivajn subtenajn membrojn de la enskribiĝkotizo; la dumvivaj subtenaj membroj havu membrolegitimilon jam en la formo de ŝildo por partoprenantoj; en la partoprenliston oni nur transprenu dumvivajn subtenajn membrojn, kiu aliĝis 1 monaton antaŭe aŭ pagis surloke por tio 0,2 AKU.
7.2 La senato petas ASci.Jarmark, kiu havas polan ŝtatanecon kaj lingvokonon kaj loĝas proksime al la prezidanta sekretariejo, preni la iniciaton por ordigi la situacion de la pola filio de AIS; sen tiu bazo ne eblas realigi seriozan kunlaboron inter lia Eŭropa Universitato Poznan kaj AIS.

8. *(Akademiaj rekomendoj)*
Kiel temon de la Akademia Forumo dum SUS 14 la senato elektis „Ĉu scienco subiĝu sub 'kakokration'?“ Gvidu la forumon OProf. Tyblewski. La inaŭguran paroladon faru OProf.Frank.

9. *(Diversaĵoj)*
9.1 La tempo ne sufiĉis al la nova senata sekretariino prepari la liston de ankoraŭ kontrolendaj antaŭaj senatkunsidoj (vd. la protokolon de la 24a senatkunsido).
9.2 La senato decidis, ke la kontrakto kun la senata sekretariino pri la plenumo de la taskoj, kiuj transiras la limojn de honorofica laboro (t.e. la laboro kiel direktorino de la prezidanta sekretariejo) ja estu farita kiel jam decidite rilate la enplanigendajn kostojn, sed sen difini ilin eksplicite sed tiel, ke oni referencu al BAT IIa (adekvata salajro-tabelo) kaj fiksu la labortempon laŭprocente.

1994-11-01/1694pfR

ASci.Mag.	OProf.Dr.habil
J.Lewoc,	H.Frank,
Senata Sekretario	prezidanto

Protokolo de la Asembleo de la Subtena Sektoro de AIS, okazinta kadre de SUS 14, dimanĉon, la 25an de septembro 1994 en la universitato de Sibiu, 18:00 - 18:30 h.

1. *(Formalaĵoj)*
La kunvoko okazis konforme al art. 9.3 de la regularo pri instruado kaj studado. La sekretario malfermis kaj gvidis la kunsidon. Ne estis dubo pri la kvorumeco nek protestoj kontraŭ la protokolo de la kunsido okazinta 1994-08-28, nek kontraŭ la tagordo. ILo estis la ununura laborlingvo.

2. *(Ĝenerala raporto)*
AIS Rumanio kiel kolektiva subtena membro organizis SUS 14. La Asembleo dankis al Mag.Sara Reisenauer, estrino de AIS Rumanio, kaj al ĉiuj, kiuj helpis al ŝi.

3. *(Financa raporto)*
Nenio estis aldonata al la raporto farita jam en San Marino.

4. *(Decidoj kaj proponoj)*
4.1 Por simpligi la ĝisnunan proceduron kaj konformigi ĝin al la reala labordistribuo, la Asembleo decidis unuanime, ke la subtena sektoro estonte rezignu pri la enspezo de la aliĝkotizoj al SUS, kondiĉe ke la dumvivaj subtenaj membroj bontempe aliĝantaj ne devos pagi kotizon, kaj ke la preskostoj de la programkajero kaj de ties ebla dissendo same kiel la kostoj de la partoprenŝildetoj kaj de la listo de la partoprenantoj ne plu estu kovrendaj de la SubS. Ĉio ĉi koncernu la kolektivan membron de la SubS, kiu kiel landa AIS-asocio organizas la sesion, aŭ, se la laboroj estis komplete centre farendaj, la sciencan sektoron. Kaze de SUS 14 tiuj enspezoj en DM iru al la servobonhavo de AIS Rumanio.
4.2 La Asembleo rajtigis kaj petis la prezidanton de AIS, en ĉi tiu kvalito kaj en lia kvalito de estrarano de la SubS kontrakti kun Akademia Libroservo (AL) pri la transpreno de - unuflanke - la vendaĵoj apartenantaj al la SubS (ISD, regularoj, Acta Sanmarinensia, AIS-broŝuro same kiel gluŝildoj, AIS-distingiloj, eble AIS-kravatpj kaj aliaj AISaĵoj), kaj - aliflanke - de la tasko, ilin oferti kaj per vendadekspozicio dum SUS kaj per prezlisto ebliganta perpoŝtan aĉeton. Estu interkonsentota ia listo de la dum SUS minimume ofertendaj aĵoj. La listo estu estonte aktualigenda en interkonsento inter la reprezentanto de AL, la prezidanto de AIS kaj la direktoro de la SubS.

4.3 Por eviti maljustajn ŝanĝojn en la AIS-buĝeto favore al la servobonhavoj kiel sekvo de la 25%a plialtigo de la AKU-kurzo en DM ekde la 1-a de januaro 1995 la Asembleo proponas al la Ĝenerala Asembleo la jenan decidon: Se 1994-12-31 la stato de certa servobonhavo ne superos 1 AKU-n, ĝi tiel restu ĝis 1995-01-01. Se ĝia stato ja superos 1 AKU-n, tiam estu konstatata ĝia minimumo dum la evoluo ekde kiam la servobonhavoj transiris el la ŝuldoj de AIS en la ĉelligitajn rezervojn; la nova stato ekde 1995-01-01 egalu al tiu minimumo plus 80% de la diferenco inter la ĉijarfina stato kaj tiu minimumo.

4.4 La Asembleo konstatis, ke la rimedoj de la SubS ne sufiĉos por kovri la kostojn de nova AIS-broŝuro, de ISD 1996-1999 kaj de la aktualigita regularo sen akiri kromajn donacojn. Ankaŭ por studadstipendioj kaj aliaj celoj plia subteno flanke de mecenatoj estas dezirinda. La Asembleo reliefigis kiel imitindan modelon la Premion Pirlot. Trovendas decaj manieroj instigi mecenatojn.

5/6. *(Elektoj. Diversaĵoj)*
Elektoj ne okazis. Aliaj punktoj ne estis pritraktataj.

1994-11-04

Protokolis: OProf.Dr.habil.H.Frank, sekretario

Protokolo de la 18-a Ĝenerala Asembleo (la 15a post la oficialigo) de AIS San Marino, okazinta kadre de SUS14, je 1994-10-01/1694pfR, 18:00-19:00 h en la universitato de Sibiu, salono Descartes.

1. *(Formalaĵoj)*
Sen kontraŭvoĉo estis konstatitaj resp. aprobitaj la regularkonforma alvoko, kvorumeco, ĉeesto de gastoj, protokolo de la antaŭa kunsido (diskonigita per afiŝo kaj intertempe publikigita en GrKG/H. 35/4, 1994) kaj tagordo.

2. *(Ĝenerala Raporto de la Senato)*
La prezidanto resumis la rezultojn de la 25-a kunsido de la Senato.

3. *(Financa raporto.)*
Nenio estis aldonenda al la raporto donita al la 17-a ĜA.

4. *(Decidoj)*
La ĜA akceptis unuanime la proponon de la Subtena Sektoro kaj de la Senato pri la apliko de la kurzplialtigo de la AKU al la statoj de la servobonhavoj: Se 1994-12-31 la stato de certa servobonhavo ne superos 1 AKU-n, ĝi tiel restu ĝis 1995-01-01. Se ĝia stato ja superos 1 AKU-n, tiam estu konstatata ĝia minimumo dum la evoluo ekde 1989-12-31 (en tiu jaro la servobonhavoj transiris el la ŝuldoj de AIS en la ĉelligitajn rezervojn); la nova stato ekde 1995-01-01 egalu al tiu minimumo plus 80% de la diferenco inter la ĉijarfina stato kaj tiu minimumo. Kalkulite en DM do kreskos komence de 1995 ĉiu servobonhavostato, kiu estas pozitiva jarfine 1994; ĝi kreskos je 25%, se la jarfina stato ne superas 1 AKU (t.e. ĝis tiam 100 DM), alie ĝi kreskos je almenaŭ 25 DM - sed je pli ol 25 DM, nome je 25% de la minimuma servobonhavostato inter 1989-12-31 kaj 1994-12-31 nur, se ĉi tiu superas 1 AKU. Per tio oni celis unuflanke respekti la principon de la konstanta valoro de la AKU sendepende de la ioma malplivaloriĝo de la DM, aliflanke eviti, ke tro da libere uzebla kapitalo (kalkulita en DM) transiru en la ĉelligitajn rezervojn, krom se tio estas proksimume kompensita per la interezoj akireblaj dum 5 jaroj el unuopa servobonhavo.

5. *(Kromaj tagordaj punktoj)*
Neniu alia tagorda punkto estis enŝovita dum punkto 1.

6. *(Elektoj)*
Elektoj ne okazis.

7. *(Diversaĵoj)*
Nenio protokolinda estis pritraktata je tiu punkto.

1994-11-04/1694 pfR

ASci.Mag. J.Lewoc, Senata Sekretariino	OProf.Dr.habil. H.Frank, prezidanto

La Teknika Universitato Berlin

festos kune kun AIS kaj nia kolektiva subtena membro „Institut für Kybernetik Berlin e.V. - Gesellschaft für Kommunikationskybernetik“ je 1994-12-09, 18:00 h, en la salono H 1035 de la ĉefdomo, la 100-jariĝon de la naskiĝo de Hermann Schmidt. Festparolados la profesoroj Giloi, Völz kaj Stachowiak.

En salono H 107 okazos je 1994-12-10 je 10:00 h la jarĉefkunveno de AIS Deutschland e.V., 11:30 h tiu de IfK Berlin e.V.

Skizo de speciala studadplano cele bakalaŭriĝon ĉe AIS en la fako KLERIGKIBERNETIKO.

(konkretigo de la kadra studadplano publikigita en GrKG/H 35/3, 1994, p. 89-90)

Art. 1

Validas la koncernaj preskriboj de artikolo 1 de la kadra studadplano.

Momente la jenaj fakuloj pri klerigkibernetiko estas efektivaj membroj de AIS:

AProf.An, OProf.Frank, OProf.Lánský, OProf. Muzic, OProf.Sangiorgi, OProf.Weltner. La skizo estas aprobcele sendita al ili. Pri la sekvaj konkretigoj de la kadra studadplano ne montriĝis malsamopinio.

Art. 2

Validas la artikolo 2 de la kadra studadplano sen aldono.

Art. 3

Validas la artikolo 3 de la kadra studadplano kun la jenaj konkretigoj:

La amplekso de la studado de la esenca instruaĵo ne malsuperu 26 studunuojn. Ili konsistu el

– A0 ≥ 12 studunuoj el la jenaj, nemalhaveblaj fakkoncernaj kontribuoj el aliaj fakoj: Informaciteorio. Statistiko. Logiko kaj/aŭ teorio de aŭtomatoj. Strukturo kaj/aŭ programado de komputiloj. Teknologio kaj/aŭ uzado de klerigperiloj. Klerigkibernetika fakterminaro.

– A1 ≥ 8 studunuoj el la jenaj kernaj kursoj: Enkonduko en la kibernetikan pedagogion. Enkonduko en la kibernetikan psikologion. Laŭkvantaj metodoj de la klerigkibernetiko.

– A2 ≥ 6 studunuoj el fake kaj fakaplike pliprofundigaj kursoj pri la jenaj kampoj: Mezurado de instrusukceso kaze de enobjektigita instruado. Transfer- kaj/aŭ koherecteorio.

Art. 4

Validas la artikolo 4 de la kadra studadplano sen aldono.

Art. 5

Validas la artikolo 5 de la kadra studadplano kun la jenaj konkretigoj:

La amplekso de la studado de la metateorie pliprofundigaj kaj praktike aplikigkapabligaj kursoj ne malsuperu 8 studunuojn. Ili konsistu el

– C1 ≥ 4 studunuoj el la jenaj metateorie pliprofundigaj kursoj aŭ kurskampoj: Propedeŭtiko al la klerigscienco prospektiva. Historio aŭ filozofio aŭ pedagogio de la komunikadkibernetikaj fakoj.

– C2 ≥ 4 praktike aplikadkapabligaj kursoj, nome didaktiko de aŭdvida lernstirado aŭ didaktiko de perkomputila instruado aŭ planado kaj organizado de kursoj.

Art. 6

La studado eblas plejgrandparte kaj en la Universitato de Sibiu/Hermannstadt (parte en ILo) kaj en la Universiato de Paderborn (en la Germana). AIS ofertas dum studadsesioj kursojn el la menciita repertuaro plejgrandparte en ILo. Kelkaj kursoj estas haveblaj per la instruteko de AIS, pri aliaj ekzistas faklibroj precipe en la Germana, parte en ILo, nome la volumoj 5-8 de Meder/Schmidt/Lánská (komp.) Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko, la du volumoj de Frank, Kybernetische Grundlagen der Pädagogik kaj la laborpresaĵo pri psikokibernetiko kiel parto de prospektiva klerigscienco. Minimume OProf.Frank respondos al pli konkretaj demandoj.

La evoluigo de normigita ekzamenmaterialo komenciĝis kaj estos laŭbezone bontempe kompletigata.

Art. 7.

Validas la artikolo 7 de la kadra studadplano kun la jena precizigo:

La skriba ekzameno okazadas per tasko el la kursaro „laŭkvantaj metodoj de klerigkibernetiko", kerne simila al la (dulingva) taskaro en Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko, vol.7, pj. 1022-1059 aŭ en la fina parto de la laborpresaĵo pri psikokibernetiko kiel parto de prospektiva klerigscienco – kun aldonaj demandoj pri la terminaro (vol.6, pj. 1047-1054) kaj la teoria fundamento pritraktita en la kursoj enkondukantaj en la kibernetikajn pedagogion kaj psikologion.

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo.
Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. - Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". - Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/ Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". - En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. - Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). - Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". - Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 - 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.